n-ro 90

oktobro 2005

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## IKEF sen prezidanto kaj sen sekretario

Sur la venontaj paĝoj la leganto konstatos ke s-ro Braun adiaŭis kiel prezidanto kaj sekretario de IKEF, kaj ke ne anoncis sin anstataŭanto. Konsekvenco de tio estas ke preskaŭ ĉiuj taskoj (kasisto, membro-administrado, korespondado, redaktado de la revuo, prizorgado de la retpaĝoj...) venas sur la ŝultrojn de nur unu persono. Atendante novajn homfortojn necesas dumtempe iom adapti la funkciadon de IKEF. Legu pli je p. 3.

Aliflanke, bona novaĵo estas ke d-ro Achim Hornecker promesis okupiĝi pri la ellaboro de reta adresaro de IKEF-anoj. Viaj opinioj kaj sugestoj pri tio bonvenas ĉe achim(a)hornecker.de.

rr

## Enhavo

Ŝanĝoj ĉe IKEF . . . . . . . . . . 3
Raportoj pri la Universala Kongreso en Vilnius . . . . . . . . . . 4
Adiaŭa parolado de la prezidanto . . . . . . . . . . 6
Terminologio . . . . . . . . . . 8
Vizito al la Industria, Komerca kaj Metia Ĉambro de Vilnius . . . . 9
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . 9
Novaj adresoj, membroj, laborplano, peranto por Kroatio . . . . . . 12



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi. **Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). [Tarifoj provizore duonigitaj ekde fino de 2005.] Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav Morankić, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

**<u>Ŝanĝoj ĉe IKEF</u>**

Post la retiriĝo de s-ro Braun necesas kelkaj simpligoj (eble dumtempaj) kaj restas pluraj taskoj plenumotaj, atendante novajn aktivulojn.

<u>Revuo</u>

La enhavo de La Merkato pli kaj pli limiĝas al pure internaj aferoj de IKEF; mankas valoraj kontribuoj pri komerco kaj ekonomio. Tial la revuo ekde 2005 nur aperos dufoje jare, en aprilo (kun i.a. raporto pri la pasinta jaro) kaj en oktobro (kun i.a. raporto pri la universala kongreso). La retpaĝoj estos, laŭeble, daŭre aktualigataj.

Kvankam iuj sugestis eldoni LM nur rete, restos prioritata la papera versio. Ĝi havas pli da ŝancoj esti legata kaj retaliro por multaj IKEF-membroj estas neebla aŭ multekosta. Por limigi nenecesajn sendaĵojn, mi tamen petas membrojn kiuj ne bezonas la paperan version sciigi al ikef(a)telenet.be kion ili estonte preferas: retan sendon de LM en .pdf-formo aŭ retan sciigon kun URL (interretadreso) kie nova numero estas je dispono.

<u>Kotizo</u>

La kotizoj duoniĝas al 7,50 aŭ 5,00 eŭroj (depende de la landokategorio). Pro la peza administrado kiun ĝi bezonis forfalas la sistemo de kutima kotizo IKEF/TAKE. La ideo por simple nuligi la kotizon ŝajnas neakceptebla: estus nehoneste por la dumvivaj membroj kaj la membroj kiuj antaŭpagis kotizojn por pluraj jaroj. Aliflanke, eĉ duonigita kotizo restas alta por kandidat-membroj en triamondaj landoj kaj subteno restas bonvena.

<u>Retpaĝaro kaj membroadministrado</u>

Necesus entute reverki kelkajn informajn tekstojn sur la retpaĝoj de IKEF. La kunfunkciado de la retpaĝaro, la nuna kaj la nova membro-administrado dependos de la projekto kiun ellaboros d-ro Hornecker.

<u>Aliaj taskoj</u>

Abundas aliaj taskoj kiuj atendas volontulon:
- verkado de artikoloj por Monato pri landoj ĝis nun ne pritraktitaj en tiu revuo;
- varbado de komercaj anoncoj por tiu revuo;
- serĉado kaj tradukado esperanten de klerigaj kursoj por niaj membroj;
- entuta repripenso de la agado de IKEF...

Roland Rotsaert (ikef(a)telenet.be)



**<u>Raportoj pri la Universala Kongreso en Vilnius</u>**

<u>Neformala kunveno de komercistoj je sabato 23 julio</u>

Jam sabate vespere kunvenis 13 personoj al aparta kunsido de esperantistaj komercistoj. Tio estis iniciita de nia ĉina estrarano s-ro WANG Tianyi (IKEF 117), kiu mem pangajnas sian vivon per komercado per Esperanto. Bedaŭrinde li lastmomente estis malhelpita veni al Vilnius. Anstataŭ li s-ro Stasys KRUZINAUSKAS (IKEF 207) gvidis la kunsidon. La ĉeestintoj prezentis sin kaj siajn efektivajn komercadon aŭ planojn por tio. Sekvis vigla interŝanĝo de informoj kaj opinioj.

<u>Raporto pri la Ĝenerala Kunveno 2005 de IKEF je 26 julio 2005</u>

Je mardo 26 julio 2005 okazis la Ĝenerala Kunveno de IKEF en la salono Grabowski kadre de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilnius (Litovio). Prezidanto Franz Josef BRAUN (IKEF 4) povis saluti 43 ĉeestantojn, inter ili 24 membrojn. IKEF aĝas ĉi-jare 20 jarojn; ĝi estis fondita je 6 aŭgusto 1985 kadre de la 70-a UK en Augsburg, Germanio. UEA-prezidanto Renato Corsetti skribis en sia salutmesaĝo i.a.: „La rolo de IKEF en Esperantujo estas esenca. Dum ne eblas aĉeti kamionon en Esperanto, Esperanto ne estas vera lingvo".

Jen la tagordo de la Ĝenerala Kunveno:

1. Raporto de la prezidanto pri la agado de IKEF en 2004
2. Financa Raporto por 2004 de la financa konsilanto
3. Decido pri la uzo de la profito de 330,20 EUR
4. Malŝarĝigo de la estraro
5. Elektoj al la estraro
6. Adiaŭa parolado de la prezidanto
7. Diskuto pri celoj, taskoj kaj agadoj farotaj de IKEF
8. Diversaĵoj

Braun, kiu post 20 jaroj ne plu kandidatiĝis kiel prezidanto, pritraktis en sia raporto pri la agado de IKEF malpli la agadojn de la pasinta jaro 2004 ol la sukcesojn kaj ĉefajn temojn de tiuj 20 jaroj ekde 1985, i.a. la statuson de "faka asocio aliĝinta al UEA", la establon de la retpaĝaro www.ikef.org, la ĉiujarajn vizitojn al firmaoj aŭ ekonomiaj institutoj en la kongresa urbo, la eldonon de fakaj terminaroj kaj libroj, la reklamanoncojn por firmaoj en la revuo MONATO kaj la komercadon per Esperanto, precipe de la ĉinaj membroj. Pri la jaro 2004 mem, li ne tiom pozitive raportis, ĉar laŭ li konstateblas certa stagnado, ja eĉ regreso de la agadoj.

La financan raporton prezentis la financa konsilanto Roland ROTSAERT (IKEF 3). Rezultiĝis en 2004 profito de 330,20 EUR. Sed Rotsaert rigardis tion negativa, ĉar ĝi ekestis pro manko de realigitaj projektoj. Krome la kotizpago de la membroj ofte ne okazas en deca tempo, li diris. La ĉeestintaj membroj akceptis la proponon de la estraro pri aldono de tiu profito al la kapitalo. Krome ili unuanime sekvis la proponon de d-ro Gianfranco POLERANI (IKEF 12) pri malŝarĝigo de la estraro.

Por la elekto al la estraro, kies prodecon kiel kutime efektivigis nia revizoro d-ro Polerani, nove anoncis sin nur unu membro, nome d-ro Achim HORNECKER el Freiburg, Germanio (IKEF 337). Li estis unuanime elektita, same kiel estis reelektitaj la ceteraj tri estraranoj, kies deĵorperiodo ĉi-jare finiĝis: s-ro Silvio KNIESS MATES (Brazilo, IKEF 250), Prof. OOBA Atsuo (Japanio, IKEF 75), s-ro Roland ROTSAERT (Belgio, IKEF 3). La estraro konsistas nun el 6 personoj: Hornecker, Kniess Mates, Kurz, Ooba, Rotsaert, Wang. Neniu el ili pretis transpreni la taskon de prezidanto, tiel ke ĝis alia decido la estraro rolos kaj kunlaboros sen prezidanto.

La ĝisnuna prezidanto kaj kunfondinto de IKEF, Franz Josef BRAUN, menciis en sia adiaŭa parolado la esencajn sukcesojn de IKEF en la 20 jaroj de ĝia ekzistado, sed li diris ankaŭ kritikojn. Li aparte dankis al tri estraranoj, kiuj dekomence kun li deĵoris kaj modele agadis. La adiaŭa parolado estas legebla aliloke.

En la sekva diskutado s-ro Georges SOSSOIS (IKEF 101) demandis pri la ekzisto de retaj eldonoj de komercaj terminaroj. S-ro Rotsaert respondis, ke la Komercaj Ĉambroj (por iliaj verkoj kiujn IKEF tradukis) ne donas la rajton al tio; la Sindikata Terminaro nun rete konsulteblas je www.ikef.org, rubriko 'Eldonoj'. Krome s-ro Sossois proponis por IKEF la establon de interŝanĝoj de servoj inter Afriko kaj Eŭropo. Tiurilate s-ro Rotsaert disdonis informfolion pri projekto de s-ro Henriel F. Fidilalao el Madagaskaro pri kreo de retkafejo (kun diversaj aldonaj servoj). Rotsaert menciis pozitive ke ekzistas tiukaze konkreta kaj fidinda projektoplano (konsultebla je www.ikef.org, rubriko 'komercaj anoncoj') kun investosumo de 8.500 EUR. Kiu el la ĉeestintoj pretas subteni tiun projekton, bonvolu kontakti s-ron Rotsaert.

S-ro Kees RUIG (IKEF 68) proponis anonci estonte en la Kongresa Libro la vizitojn de IKEF dum la UK-semajno al firmaoj aŭ ekonomiaj institutoj kiel oficialan programeron. La nova estraro decidos pri tio.

S-ro Michael CWIK (IKEF 51) demandis pri tradukreto ene de IKEF, kiu povas helpi al firmaoj aŭ aliaj ekonomiaj instancoj por la tradukado de tekstoj el naciaj lingvoj al Esperanto aŭ inverse aŭ de unu al alia nacia lingvo. S-ro Braun respondis, ke IKEF ne havas tian formalan reton, sed ke la membroj de nia Terminara Sekcio helpas en tiukazaj demandoj, kaj krome IKEF havas bonajn rilatojn al ITRE, aparta internacia



tradukreto de s-ro Daniel DURAND en Francio.

S-ro João O. VEIGA RODRIGUES (KN 1396) serĉas vendokanalon en Eŭropo por kafo de la brazila firmao CSB. S-ro Ruig atentigis pri la malfacilo de diversaj kafogustoj ĉe eŭropanoj kaj rekomendis al li kontakton kun Komerca Ĉambro. S-ro Veiga Rodrigues disdonis specimenojn de sia kafo al kelkaj ĉeestintoj por testo. La ricevintoj estas petataj raporti al s-ro Veiga Rodrigues pri la gustorezulto de siaj testoj.

FJB

**<u>Adiaŭa parolado de la prezidanto</u>**

Estimataj gesinjoroj, karaj membroj de IKEF, karaj gastoj interesataj pri nia afero!

La elektoj al la estraro ĵus finiĝis; mi ne plu estas en la boato.

La nova seskapa estraro estas elektita. Bedaŭrinde hodiaŭ neniu pretis transpreni la oficon de prezidanto. Mi ne rigardas tion katastrofo. Supozeble la aktualaj taskoj kaj laboroj de la estraro povas esti deciditaj en kolega interkonsento. Eble post kelke da tempoj iu inter la nunaj estraranoj kaptos la kuraĝon preni la prezidantan oficon.

Bonvolu nun permesu al mi, ke mi fine de mia oficotempo diras kelkajn vortojn kaj faras resumon de 20 jaroj da laboro por IKEF kaj Esperanto.

Post preparo de la fondo de nia fakgrupo kune kun Lawrence Mee en la jaro 1984 kaj dum la oficiala fondo de IKEF en la UK 1985 en Augsburg mi estis elektita ĝia prezidanto. Do, de 20 jaroj mi deĵoras en tiu ofico kaj ĉiuj du jaroj vi aŭ la respektivaj ĉeestintoj en nia Ĝenerala Kunveno reelektis min. Pro tiu granda konfido mi kore dankas vin kaj niajn membrojn hodiaŭ ne-ĉeestantajn.

Sed nun, post 20 jaroj, venas *time to say goodbye*. Tre malofte mi uzas anglajn vortojn, sed tiu esprimo (tempo por adiaŭi!) aparte plaĉas al mi. Pluraj kaŭzoj postulas tion.
Unue post 20 jaroj ĉiu laboro fariĝas rutina, kaj elĉerpiĝas la stoko de novaj ideoj.
Due mi mem ĉiam opiniis, ke prezidanto de komerc-ekonomia asocio kiel IKEF devas esti persono kiu staras ankoraŭ en la aktiva laboro, kiu havas daŭran kontakton kun entreprenoj kaj ekonomiaj instancoj; do ne iu emerito – kiel mi estas de 7 jaroj.
Trie la nuna elektronika mondo de komputiloj kaj interreto bezonas estron kiu perfekte regas tiujn ilojn por utilo de la asocio. Estas generacia problemo de mi, ke mi regas ĝin nur nesufiĉe.

Kion mi spertis en tiuj 20 jaroj?

Unue mi sentas grandan ĝojon pri la evoluo de nia fakgrupo de nulo al la nuna stato. UEA-prezidanto Renato Corsetti skribis i.a.: “Multajn bondezirojn al IKEF, kies rolo en Esperantujo estas esenca. Dum ne eblas aĉeti kamionon en Esperanto, Esperanto ne estas vera lingvo”

Pro tiu sukceso mi volas danki al miaj plej aktivaj kunlaborantoj en tiu tempo:
Roland Rotsaert, kiu dekomence estis nia financa konsilanto, ŝparema kasisto kiu ĉiam ekonomie agadas. Baldaŭ li ankaŭ transprenis la rolon de membrara administranto, kaj kiam en 1993 la tiama redaktoro de nia komunikilo „La Merkato“ pro tempomanko fariĝis malakurata, li ankaŭ transprenis ties laboron redakti kvarfoje jare La Merkato-n, kion li faras akurate ĝis hodiaŭ. Krome li ankaŭ partoprenas en traduklaboroj de la Terminara Sekcio kaj ĉiam aktualigas nian retpaĝaron www.ikef.org. Roland Rotsaert efektive estas la plej aktiva membro de IKEF. Plie mi volas danki al d-ro Gianfranco Polerani. Li estis dekomence nia revizoro, ekde 1994 li fariĝis nia delegito en la Komitato de UEA, kaj ekde 1999 li ankaŭ transprenis la rolon de peranto por Italio. Krome li estas ĉiam helpema, se speciala tasko ekestas, kvankam li ne estas la plej juna. Specialan dankon ankaŭ meritas s-ro Yamasaki Seiko. Li estis estrarano dum la unuaj 16 jaroj kaj.li estras ĉiam ĝis nun nian Terminaran Sekcion kaj krome li ankaŭ estas peranto por Japanio.

Krom tiuj tri kolegoj, kiuj dum la tuta tempo de 20 jaroj fidinde kunlaboris kun mi, ekzistis/as kompreneble multaj aliaj estraranoj kaj aliaj membroj, kiuj aktive kunlaboris/as kaj kontribuis per bonaj ideoj al la celoj de nia fakgrupo. Bonvolu kompreni ke mi ne povas nomi ĉiujn.

Kiel apartajn sukcesojn, pri kiuj mi ĝoje memoras en tiu 20 jaroj, menciendas (sen iu laŭvica ordo):
- la statuso „faka asocio aliĝinta al UEA“;
- la establo de nia retpaĝaro www.ikef.org helpe de Stefan Fisahn, ne IKEF-ano;
- la preskaŭ ĉiujaraj vizitoj al firmaoj aŭ aliaj ekonomiaj instancoj de la kongresurbo en la UK-semajno;
- la ekonomia seminario 2001 en Storckensohn (Alsaco, Francio) kune kun nia partnera asocio TAKE;
- ĝenerale la terminara sekcio sub gvido de s-ro Yamasaki, aparte pri Esperanto-eldono de la du ICC-verkoj “Inkotermoj 2000” kaj “Dokumentaj Kreditoj”;
- multaj reklamanoncoj de entreprenoj en la revuo MONATO;
- serio de artikoloj en MONATO kun la titolo „Historio de la ekonomia pensado“ de nia sveda membro Bo Sandelin;
- filmo-intervjuo kun profesoro Reinhart Selten, aranĝita de nia estrarano Rainer Kurz;
- rekorda ĉeestantaro en la pasintjara Ĝenerala Kunveno en Pekino (107 personoj) kun la ĉefa temo „Komercado per Esperanto“.



Mi povus daŭrigi tiun liston, sed ne volas enuigi vin.

Bedaŭrinde la laboro en IKEF faris en tiuj 20 jaroj ne nur plezuron. Mi volas ne prisilenti ke estas ankaŭ kaŭzoj por plendado kaj kritiko. Ĉefa kritikero estas la ĝenerale nesufiĉa aktiveco de la plej granda parto de nia membraro. El la 120 – 140 membroj efektive agadas malpli ol kvarono laŭ niaj Statuto kaj laborplano aŭ faris ion specialan laŭ sia ebleco kaj siaj profesiaj laboro kaj spertoj. En nia Ĝenerala Kunveno ofte multaj faras proponojn, kiujn “oni” devus fari. Sed se mi demandas kiu pretas plenumi tion kion li proponas, aŭ se mi petas por ekzemple kunlabori en la Terminara Sekcio por krei vortaron, aŭ kiu povas havigi reklamanoncojn de entreprenoj por MONATO aŭ kiu povas realigi specialan projekton, ekzemple krei membraradministradon per interreto: granda silentado. Tiu sinteno ja estas tre disvastigita en la Esperanto-movado. Sed IKEF estas profesifaka asocio pri ekonomio. Do de niaj membroj ni rajtas ekspekti profesiecan (ne laikan) labormanieron kaj konduton!

Multaj opinias, ke sufiĉas pagi la kotizon. Iujn laborojn faru la aliaj. Sed mi rediras, ke membreco en IKEF verdire signifas por ĉiu membro ke li/ŝi estas interesita pri progreso de nia komuna afero, la internacia lingvo Esperanto, ankaŭ en komerco kaj ekonomio kaj ke li/ŝi mem faru ion por tiu progreso.

Fine de mia prelego kaj ankaŭ fine de mia ofico kiel prezidanto, mi volas denove alvoki niajn membrojn ke ili aktive kunlaboru kun la nova estraro per celtrafaj agadoj – ĉiu laŭ siaj spertoj kaj kapabloj. La taskaro sur la tri kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomiko estas tiom vasta, preskaŭ senfina – vidu la eldiron de la UEA-prezidanto pri la kamiono -, ke por ĉiu inter ni kuŝas ŝanco por taŭga aktiveco kaj sukceso. Sed tia sukceso ne venos de si mem, ĝi bezonas aktivan persistan pritraktadon fare de ni. Mi ĝojus, se IKEF estonte havus novan progreson, kaj mi promesas estonte aktive plulabori kiel normala membro. Vivu IKEF! Vivu Esperanto!

Franz Josef Braun

**Terminologio**

Du retpaĝoj pri terminologio estas renovigitaj:

- TEC (Terminologia Centro de UEA) je http://esperanto.net/tec
- REVO (Reta Vortaro) je http://purl.org/NET/voko/revo/

Mi ĝojus se iu por venonta numero de La Merkato pretus verki detalan artikolon pri ambaŭ.

rr

**Vizito al la Industria, Komerca kaj Metia Ĉambro de Vilnius (jaŭdo, 28 julio)**

25 membroj de IKEF, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, jaŭdon posttagmeze vizitis la Komercan Ĉambron de Vilno. La viziton preparis nia membro s-ro Stasys KRUZINAUSKAS; li ankaŭ aranĝis la transporton ekde la kongresejo kaj reen.

S-ro Aleksandras Laurinavicius, direktoro pri informado kaj publikaj rilatoj de la Litovia Evoluiga Oficejo (www.lda.lt) donis detalojn pri la ekonomiaj strukturoj de Litovio. La lando havas 3,5 milionojn da enloĝantoj. Ĝia brutta nacio produkto atingas 50 % de la tuto de la baltaj ŝtatoj kaj rapide kreskas. Jam antaŭe Litovio estis konsiderata kiel la Silikona Valo* de Sovetio kaj post la sendependiĝo ĝi restis teknike avangarda.

Komparo de la jaroj 2000 - 2005:

ekonomia kresko: ĉiujare inter 6 kaj 10 %
prezstabileco: de -1 % gis + 2 %, do bona prezostabileco
senlaboreco: de 12 % en 2000 al 6 % en 2005

El posta demandado memorindas ke la ŝtata ŝuldo kun 20 % de la BNP estas malalta, ke agrikulturo okupas 16 % de la loĝantaro, kontraŭ 8 % en tuta EU - sed ke necesas importi plejparton de la legomoj, kaj ke litovaj mem estas la plej aktivaj investantoj.

Poste s-ino Irena Jasiukeviciute, estrino de departamento por internaciaj rilatoj de KĈ de Vilno (www.cci.lt) parolis. Litova KĈ estis fondita en Kaŭnas en 1924. Ĝi ne ekzistis dum 1940-1973. En 1973 ĝi estis refondtia laŭ sovetia modelo. Ekde 1991 ĝi havas strukturon kiel en cetaraj EU-landoj. Estas 6 regionaj ĉambroj. Tiu de Vilno havas 450 membrojn.

Ĉefa tasko estas evoluigo de komerco. Krome KĈ disdonas certifikatojn de origino, ATA-dokumentojn en EAN-kodojn.

rr

**Ingeniero intertempe sciigis ke preferindas "Silicia Valo" kiel tradukon de "Silicon Valley". Silicio (Si) (angle "silicon") estas la kutima bazo de elektronikaj cirkvitaroj.*

**Anoncita aranĝo**

15-20 aprilo 2006, Kantono, Ĉinio: kunveno de ĉinaj IKEF-anoj okaze de la Ĉina Foiro. Informoj: Wang Tianyi, informo(a)komerco.com.



**Komercaj petoj kaj proponoj**

Angolo

Ni serĉas partnerojn pri: konstruado, industrio, industria fiŝkaptado, ĝenerala komerco, minaĵo, diamanto, petrolo, ktp. Kontaktu: s-ron Joao Claudio TUKIFIMPA NSOKO, C.P 5474, LUANDA, ANGOLA; rete: jc_nsoko(a)yahoo.fr.

Ni serĉas investantojn por agrikultura/arbarekspluata projekto en Cabinda. Ĝi ampleksas 650 hektarojn. Estas bona aliro kaj ŝtata rajtigo. Eblas sendi projektstudon kaj konfirmojn de la koncernataj ministerioj kaj komerca ĉambro al interesitoj. Pastro LOUFOUENDE PANDZOU Aaron (rete loufouendeejcmc(a)yahoo.fr) aŭ Prof. EDEN LOUBAKI (rete loubakend(a)yahoo.fr) je POINTE NOIRE en CONGO BRAZZA.

Bulgario

UPIEK (Unua Privata Internacia Esperanto-Kursejo) en Sofio serĉas kontaktojn. Bulgario estas mondkonata pro siaj mineralakvoj, kurac- kaj ripozlokoj. UNESCO kaj EU investos 2 miliardojn da eŭroj por konservado de antikaj tracaj monumentoj. Estas propono dum la mezo de februaro 2006 organizi dusemajnan skiadon en Bulgario kun aŭ sen E-kurso dum la restado, renkontiĝojn, ekskursojn kaj seminariojn. Ni organizas kursojn de Esperanto por komencantoj kaj progresantoj, parolantajn rondojn, ekskursojn en Bulgario kaj najbaraj landoj, ktp. Ni ne nur atendas esperantistojn.
Lasto NIKOV, rete lastonikov(a)yahoo.co.uk.

Brazilo

Ni serĉas komerc-kompanion en la fako eksporto: **mielo, brando (manio) kaj vilaĝa-meblaro**. Rogério Pinho Ferreira, COMÉRCIO E EXPORTAÇÃO LTDA, Paraíba do Sul, CGC 07.128.484/0001-06, rete: rogerpinfer(a)uol.com.br

Brazila **kafo**: kontaku jveiga(a)veloxmail.com.br. por aktualaj prezoj kaj kondiĉoj.

Ĉinio

En mia urbo Zaozhuang de Shandong provinco (orienta Ĉinio) novtipa konstru-materialo **gips-plato** estas vaste produktita. Interesito turni sin por detaloj al: Dong Shulin, rete shulind2002(a)yahoo.com.cn, tel:86-632-6582879.

Ĉina **kuiristo**, 35jara, ŝercas laboron alilande. S-ro Yangwu, Beijing, f13045174815(a)yahoo. com cn

Mi proponas por eksporto **blovinstrumentojn** diversajn, produktitajn de Ĉinio. Bona kvalito kaj malmultkosta prezo, ĉiuj instrumentoj elektitaj de profesiuloj. Interesitoj kontaktu kun mi: Yonghua Cheng, rete chengyong_hhh(a)yahoo.com.cn.

**Artfajro kaj petardo** el Liuyang, mondcentro de artfajro kaj petardo. Se vi konas importiston, bonvolu proponi la komercon, por kio mi estas specialista komercisto... Mi povas inviti lin surloke koni la produktantojn kaj aranĝi lian aĉeton. Chielismo, chielismo(a)hotmail.com.

Ganao

Mi estas membro de IKEF kun membronumero 295. Min interesas sukero el Brazilo kaj rizo el Vjetnamio. Alfred Kobina Arthur, Ganao, rete esperogh(a)yahoo.com.

Litovio

Mi proponas lignajn aĵojn por ĉirkauaĵo hejma. de firmao el Vilkaviskis. Rigardu en www.simedva.lt. Prezojn por pograndaj aĉetantoj mi tuj prezentos post via ekintereso. Stasys Kruzinauskas, tel +370699-04065, rete stkruz(a)lrs.lt.

Malagasio (Madagascar)

Mi afable petas vian intervenon por helpi trovi monrimedon por kreo de retbutiko/servo, kiu ankaŭ liveru monrimedon por kelkaj gejunuloj. Bezonata investsumo estas proksimume 8.500 EUR. HENRIEL FIDILALAO, rete: fidilalao(a)yahoo.fr.

Rumanio

Mi serĉas firmaojn aŭ homojn kiuj volus kontaktojn, rilatojn aŭ reprezentanton en Rumanio. Mi estas konsulta inĝeniero por firmao itala-rumana por problemoj de kemio kaj mediumo kaj mi estas sperta en merkatumado (7 jarojn ĉe firmao de merkatumado GfK, el Aŭstrio.) Mi povas obteni avizojn de ministerioj, de ĉambroj de komerco, ktp, serĉi klientojn por importo kaj eksporto, kaj organizi renkontiĝojn en montturisma zono, sur la Valeo Prahova, en Busteni apud Sinaia, Brasovo. Doine Dragusin, rete mihaidragusin(a)xnet.ro.

Tajlando

MondEtur, situanta en Tajlando, estas esperanta firmao por zorgado kaj servado. Informu vin ĉe Zelimir Pehar, zpehar(a)hotmail.com kaj vidu kion ni ofertas al vi. Tutcerte vi trovos inklinon por kunlabori, esti partnero aŭ uzi niajn servojn.



Tanzanio

Nun la komerco en Tanzanio estas pli libera ol antaŭe kaj ni nun bezonas ĉinajn varojn malmultekostajn, ekzemple radio-aparatojn, mantelefonojn, vojaĝsakoj, ŝuojn, televidilojn, ktp. Ĉu eblas importi la ĉinan mueli-maŝinojn kaj malgrandajn kultivmaŝinojn? Kontaktu: Mramba Simba, smbmramba(a)yahoo.com.

**Novaj retadresoj**

295. S-ro Alfred Kobina Arthur, Ganao. esperogh(a)yahoo.com
342. Ralph SCHMEITS novavivo(a)hotmail.com

**Novaj kaj re-aliĝoj**

123. S-ro Maciej WNUK, Skrytka 105, PL-01-800 WARSZAWA 45, Pollando, maciej(a)nepo.pl
345. S-ro Valentin SEGURU, p.a. REU, ab.ya. 57, RU-105318 MOSKVA, Rusio, seguru(a)mail.ru
346. S-ro Vitautas DRASUTIS, Staniunu 39-31, LT- PANAVEZYS, Litovio

**Nova laborplano de UEA**

Je www.uea.org/dokumentoj/laborplano.html vi trovas la novan version de la laborplano. Legu ĝin kiel ekzemplon de la laborplano, kiun via landa, faka aŭ loka asocio devas redakti, se ĝi ne jam faris.

Renato Corsetti

**Peranto por Kroatio.**

Ekde nun ankaŭ estas IKEF-peranto en Kroatio: S-ro Vjekoslav Morankić, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, rete esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr

**Konkurso**

Ĝis la 20-a de decembro 2005, Ĉina Radio Internacia okazigas konkurson pri ĉina trezora insulo Taiwan. Oni lotos inter la premiitoj dek gajnintojn, kiuj senpage venos al Ĉinio por dektaga vizito. Esperanto-Redakcio ripetos la artikolojn respektive en la 3-a, 10-a, 17-a kaj 24-a de oktobro.

Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia, espradio(a)cri.com.cn